# *Avancas klinikaj provoj: tria dozo de la vakcina kandidato Mambisa*




**Vakcina kandidato  Mambisa.  foto ACN**

Havano, feb 4 (RHK) Tria dozo de la vakcina kandidato Mambisa (CIGB-669) estos donita ?i-semajne al  grupo de volontuloj flanke de la Centro de In?enierado Genetika kaj Bioteknologio (CIGB), dum oni paralele pritaksas la datumojn de imunologio de ties mallonga vakcin-skemo.

La? la kuba informagentejo ACN, la drino. Marta Ayala, ?enerala direktorino de la scienca institucio, komentis ke ?is nun la vakcina kandidato Mambisa montris per la klinikaj provoj, la sekurecajn elementojn ta?gajn kun minimumaj eventoj.

?i detaligis ke la klinikaj provoj efektivi?as en la Nacia Centro de Toksikologio kaj kombinas la du kandidatojn vakcinajn evoluigitajn de la CIGB, nome Abdala kaj Mambisa, en du imunigaj skemoj je malsamaj intervaloj, unu mallonga (0-14-28 tagoj) kaj alia longa (0-28-56 tagoj).

La fakulino anka? klarigis ke oni esploras la administran vojon intramuskolan kaj nazan. Alia grupo pritaksas unuan imunizadon intramuskolan kaj aliajn du per naza vojo (?prucigilo); dum alia grupo nur studas la nazan vojon kun tri imunigoj.

Kiam la raporto pri sekureco kaj imunigo de Mambisa estu finfarita, la CIGB proponos al la Centro por kontrolo ?tata de medikamentoj kaj medicinaj ekipa?oj (CEDMED), la kontinuecon de la fazo II de la studo en la grupo elektota, kongrue kun la atingotaj rezultoj, aldonis la fakulino.

Mambisa (CIGB-669) bazas sin sur la formulado de proteino de RBD (Domajno de Unio al Ricevanto) kaj imunopotencigilo taksita de la centro: antigeno de la nukleokapsido de la Hepatito B).

fonto: Granma

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/246708-avancas-klinikaj-provoj-tria-dozo-de-la-vakcina-kandidato-mambisa

**Radio Habana Cuba**